1-a Jaro, N-o 35

APERAS S.A.T. SEMAJNE

28. Majo 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Kelkaj strikbildoj el Ĉekoslovakio

Ĉi-suba priskribo de l' minista striko en Ostrava, kiu estas finita jam antaŭ kelkaj semajnoj, karakterizas ĉiujn strikojn, ĉiujn batalojn de la laboristaro en Ĉekosl. Jam depost 6 semajnoj strikas 1600 laboristoj de la plej granda paperfabrikejo en Ĉekosl., "Spiro" en Krumlov, Sud-Bohemio. Okazas tie la samaj scenoj kiel en Ostrava. En Nord-Bohemio estas lokaŭtitaj 10 000 metal-laboristoj. La minejposedantoj volas maldungi 15 000 ministojn.

En Ostrava strikis 88 % de la min-laboristoj. La 4. aprilo okazis granda kunveno de la strikantoj. Partoprenis ĉirkaŭ 20 000. Tute senmotive la ĝendarmaro komencis dispeladi la ĉeestintojn kaj pafadis dum la kunpuŝiĝo en la laboristaron. Du laboristoj estis mortpafitaj kaj kvin grave vunditaj (v. "S" 29, "Tra la klasbatalo"). Ankaŭ 3-monata infano estis mortigita de kuglo, erariĝinta en ĉambron.

Dum ne tutaj 6 jaroj en Ĉekoslovakio jam 23-foje estis pafita en la laboristaron. 40 homvivoj falis morte kaj 128 estis grave vunditaj. En la laboristaron oni pafas en Ĉekosl. kiel en ĉasaĵon, sed al la kapitalistaj cimoj, grandŝtelistoj, koruptistoj kaj trompistoj oni ĝis nun eĉ ne tuŝetis haron.

En ĉekosl. respubliko ni havas iajn leĝojn, laŭ kiuj neniu povas flanke de oficialaj organoj esti ĉikanita, arestita kaj batita senmotive. Fine la ĉekosl. respubliko fanfaronas ĉiam per sia "demokrateco". Kiu iomete ankoraŭ kredas tion, estus kuracita, ĉeestinte dum la tagoj de l' granda minista batalo en Ostrava. La tuta semajno estis semajno de ĝendarma diktatoreco kaj absolutismo, dum kiu la strikanta ministo estis homo sen ĉiuj rajtoj, ĝendarmo — ĉiopova potenculo.

Ĉie estis ĝendarmoj, kien ajn oni rigardis. Ĉe la ŝaktoj plenego da ĝendarmoj, surŝultre portantaj pafilojn kun en la suno briletantaj bajonetoj — ĉe la pordego 20—30, interne de l' uzino, ĉirkaŭ la tuta palisaro patrolis ĝendarmoj. Unu mino havis ĉirkaŭ 150 ĝendarmojn — kaj ĉe Ostrava estas 40 minoj! Sur la stratoj staris ĝendarmoj taĉmente, patroloj iradis, precipe sur vojoj kondukantaj el ministaj kolonioj al la ŝaktoj, ĝendarmoj estis en la laboristaj kolonioj, traveturadis ŝarĝaŭtomobiloj, ŝarĝitaj per ĝendarmoj, veturadis kirasaŭtomobiloj, oni vidis policistojn sur ĉevaloj, oni vidis ĝendarmajn kaj policistajn oficirojn en personaŭtomobiloj. — Ĝendarmoj provokas ĉie. Ostrava estis sola granda ĝendarma kaj policista kunvenejo; sur bazo de konstatitaj datoj oni taksis la la nombron de l' ĝendarmoj en Ostrava de 5 ĝis 6 mil viroj, kiuj nun post la striko disveturis al ĉiuj lokoj de la respubliko.

La unuajn tagojn de la striko, kiam ankoraŭ en Ostrava ne estis tiom da ĝendarmoj, ankoraŭ povis la strikkomitatoj kiel okazas dum ĉiu striko, stari ĉe la uzino, konstati, ĉu laboras iaj strikrompantoj. Povis ankoraŭ okazi, ke venis virinoj, komunikis strikrompantojn, admonis kaj se tio ne efikis, malhelpis ilin eniri laborejon. Tio estis dum la unuaj tagoj de la striko. Sed poste estis tute neeble al la strikkomitatoj starigi postenojn, tute neeble al la virinoj, iri al la ŝaktoj. Ekzistis sieĝa stato, milita juro, sen ia proklamo.

Ne povis la ministoj iri du- aŭ triope tra la laborista kolonio, — tuj venis ĝendarmoj, identigis, eventuale arestis kaj forkondukis la ministojn al ĝendarmejo, ilin tie retenante du aŭ tri tagojn. Sen ia motivo, sen ia kaŭzo. Estis ja necese, timigi la strikantojn, estis necese montri la fortan "potencon", kiu staras kontraŭ la ministoj. La ministo, kondamnita nur pene labori, fosi karbon, enspiradi karbopolvon kaj vegetadi dum konstanta danĝero pro mizera monero, estis forkondukita de ĝendarmoj el sia familio kaj arestita pro tio, ke li kuraĝis uzi sian naturan rajton kaj klopodis per striko atingi plibonigon de sia salajro.

Estis ŝakta kunvenego. En la laboristan domon multnombre kunvenis ministoj. Ĉirkaŭ 2000 ministoj kaj iliaj edzinoj. Sur la vojoj oni vidis tien direktitajn ĝendarmojn. — La laborista domo ne ampleksis ĉiujn ministojn, multaj staris ĉe la pordo, ĉe malfermitaj fenestroj en ĝardeno, por almenaŭ ion ekaŭdi. Estis fino de la kunveno, ĝi estis disigita. La ministoj elpenetris. Sed ekstere jam staris granda amaso da ĝendarmoj, kiuj dum la kunveno estis alvokitaj kaj alveturigitaj en ŝarĝaŭtomobiloj. La ĝendarmoj estis disstarigitaj en "svarmlinio", kvin vicoj, unu post la alia. La ministoj haltis kaj surprizite rigardis la ĝendarmojn. Dume la komandanto donis ordonon, ĝendarmoj ekpaŝis, tenante pafilon en la maldekstra mano, guman batilon en la dekstra kaj komencis dispeladi, batis, ĉu sur kapon aŭ ne kapon, per gumaj batiloj, pafilkapoj . . . :

En minista kolonio. Brue alveturas ŝarĝaŭtomobilo kun kelkaj ĝendarmoj, haltas ĉe dometo, ĝendarmoj malsuprensaltas, eniras internen. Revenante post mallonga tempspaco, ili forkondukas strikrompantojn, ŝirmante ilin, en la aŭtomobilon. Kompreneble rapide eliras ĉiuj najbaroj, precipe virinoj. La strikrompanto

estas devigita trairi ilian spaliron kun klinita kapo. La virinoj ordinare ne detenas sin por ne diri ion: ""Hontu! Vi forprenas la panon de ni kaj niaj infanoj!" — Sed la ĝendarmoj estas kiel sovaĝuloj. La plej maldelikataj insultoj estas ĵetataj kontraŭ la virinoj: "Publikulinoj, silentu aŭ . . .!" Tiu "aŭ" ordinare efektiviĝas. La virinoj pro tiuj insultoj ribeliĝas. La ĝendarmoj atakas la virinojn, batas ilin per gumaj batiloj kaj pafilkapoj, arestas kaj identigas. Tio ne estas organizitaj komunistinoj, sed grandnombre edzinoj de indiferentuloj, kiujn devigas la mizera kaj malgaja vivo de iliaj infanriĉaj familioj tiel agi, por ŝirmi la nudajn vivojn, kiujn minacas la strikrompanto.

Plej multe persekutataj estis la membroj de strika komitato kaj ĉiuj aliaj funkciuloj.

La Ostrava ministo estas nun kuracita de la iluzio, ke li havas nur unu malamikon, la karbobaronojn Larrisch, Guttmann, Wilczek & Komp. Li estas kuracita de l' iluzio, ke la reprezentantoj kaj organoj de respubliko, la ĝendarmaro, policistaro kaj oficoj estas gardantoj de leĝo kaj ordo. La batalo estis justa batalo, batalo por pli granda peco da pano. Sed al la ministoj kontraŭstaris en tiu batalo ne nur la karbobaronoj, sed ankaŭ la ŝtataj organoj de "nia demokrateca" respubliko kaj la registaraj partioj, por ŝirmi la monsakojn de la karbobaronoj.

Karbobaronoj, kapitalistoj, registaro, ĝendarmoj, policistoj, la tuta "ŝtatformanta" publiko kaj ĝia mensogema ĵurnalistiko, malfavoraj ekonomiaj kondiĉoj kaj eĉ strikrompantoj — jen supereco, antaŭ kiu la strikanta ministaro devis cedi, por eviti la malvenkon. Kaj jen — triumfe skribas la kapitalistaj kaj registaraj gazetoj, kiuj signis la strikon kiel "komunista entrepeno" kaj "bolŝevika puĉo": "Grandega malvenko de la komunistoj en Ostrava! Terurega fiasko de l' Ostrava striko!"

Laboristoj! Ĉu ne similas la sole strikanta laboristaro al taŭro[1]), incitegata kaj kruele turmentata de la "picadores, banderilleros, chulos" kaj ĉiuj aliaj funkciantoj ĉe la taŭrludo, por finfine, malgraŭ la kuraĝa memdefendo, tamen esti mortpikita per la glavo de la toreadoro kaj trenita tra la areno sub aplaŭdo de la rigardaĉanta publiko? Ĉu la sole strikanta laboristaro ne estas ankaŭ tiel incitegata kaj turmentata de tiaj "picadores, banderilleros" kaj "chulos"? Ĉu ne regas ankaŭ tia ĝojo inter la kapitalistoj pri ilia fivenko? En la "pli civilizitaj" landoj la taŭrludoj estas malpermesataj, sed kiam estus tie malpermesataj ankaŭ la kruelaj ludoj kun la laboristaro? Tio devas esti la verko de la laboristoj mem. Nur per tutmonda laborista unuecfronto la laboristoj ŝanĝos la rolojn de tiu "taŭrludo".

La tuta mondo fariĝu sola areno, en kiu ni estu la venkaj aplaŭdantoj . . . . .

Carlo Jirka (1574).

1) virbovo.

Letero el Italio

Faŝistaj kaj ruĝaj sindikatoj. — La granda metalurgista striko. — Malpermesitaj gazetoj pro unua de majo. — La tago de unua de majo en Musolinio.

La registaro disigis la Ruĝan Fervojsindikaton, ĉar ĝi malgraŭ ĉiaspeca malhelpaĵo ne volis memvole morti.

La registaro studas manieron, por transformi la sendependajn sindikatojn (metiligojn) en ŝtatajn sindikatojn (alivorte: la sindikatoj estu laŭleĝigitaj per speciala nacia regularo). Se leĝo tiaspeca aperos, eble nur la faŝistaj sindikatoj estos laŭleĝigitaj, kaj eble la aliaj, kiuj ne "obeos" (ĉar la klasbatalon oni ne povas subteni en ŝtatrondo), estos disigitaj, aŭ la industriaro agos estonte, kvazaŭ ili ne estus funkciantaj.

Antaŭ nelonge okazis ampleksa metalurgista striko. Ĝi en la komenco estis ordonita de faŝ. sindikatoj (por altiri al si la metiistojn). Poste eĉ la metalurgista federacio ordonis flankigi la strikon. Ĉe faŝ. ordono la metiistoj ne volis striki, — poste, kiam ordonis ankaŭ la Ruĝa Federacio la strikon, la striko mem tre ampleksiĝis. La industriistaro tre timis tiun amplekson. Okazis, ke la industriistaro kaj registaro tuj intertraktis kun la reprezentantoj de la faŝ. sindikato (la nombro de la anoj de tiu ĉi sindikato estas tute sensignifa). — La rezulto de tiu intertrakto estis preskaŭ nulla, ĉar oni pliigis sensignife la salajron (unu liro potage). Oni tute forlasis la moralajn aferojn. El tio vi komprenas, kiel registaro kaj industriistaro tute forgesis, intence, la kontraŭfaŝisman federacion, kiu grupigas grandegan plimulton de la metalurgistaro. La faŝ. federacio ordonis ĉesigon de la striko, kaj la kontraŭfaŝisma ordonis daŭrigi. Sed ĉar la tempoj ne estas favoraj pro ĉiaspecaj kaŭzoj, post du tagoj da plua striko eĉ la Ruĝa Federacio ordonis ĉesigon de la striko. 20 proc. el la strikantoj eniris fabrikejojn ĉe la unua ordono: la aliaj ĉe la dua ordono. —

Nek la socialista nek la komunista taggazeto aperis lastajn tagojn, ĉar ili citis la unuan de majo. La registaro eĉ malpermesis manifeston, kiun disdonis la "Confederazione del lavoro" (meti-liga unuiĝo). Tiu manifesto sole rememorigis pri la „Unua de majo", kaj la konfederacio estas nuntempe tre demokratieca kaj neagema.

Kelkaj detaloj pri la unua de majo en Milano. En la fabrikejoj malĉeestis 85 proc. da metiistoj. Ti-kiuj laboras ĉe publikservoj estis esceptigitaj de la „Laborĉambra" ordono. — Ĉe vendejoj, oficejoj, magazenoj kaj malgrandaj laborejoj, la koncernaj man-kaj plumlaboristoj tutplene laboris. Pro tio la urbo aspektis kiel en normala tago.

Tage kaj vespere grupoj da faŝistoj en metiistaj kvartaloj ĉirkaŭvagis, eniris metiistajn ejojn (vinvendejojn, kafejojn, kunvenejojn, ludejojn), kaj mokeme incitante la strikantojn, revolverpafis, manfrapis, kaj eĉ pafilpafis, bastonegfrapis la ĉeestantojn en la ejoj. Kelkfoje oni ribelis, alifoje oni forkuris. Multe da vunditoj nur inter laboristoj. Estas nenecese diri, ke la faŝ. agantoj tute ne estis ĝenitaj de la polico.

En urbo Bologna nokte de la 1. al 2. majo butikpordo de iu lignaĵisto estis perforte terĵetita, kaj la laborilaro forportita sur straton, kaj ĉio bruligita. Tio okazis *por puno*, ĉar la lignaĵisto laboris la 21. aprilo (tiu ĉi dato anstataŭigas la 1. majo, kaj estas oficiala festotago laŭleĝe, okaze de datreveno de la Roma naskiĝo, festo tute tradicia kaj patria) kaj kontraŭe ne laboris la unuan de majo.

En Romo, je 20 30 h. vespere de 1. majo, la faŝistoj eniris perforte, rompante fenestron, la sidejon de la "Unuigita Socialista Partio" (pli bone mi nomas ĝin demokrata partio) kaj difektis multajn aĵojn, kiuj troviĝis en la sidejo. Per hakilego ili jam ekdisrompis meblojn, sed ĝustatempe alkuris policistoj haltigante la rompadon. La policistoj arestis unuamomente nur *unu* faŝiston, sed poste ankaŭ liberigis tiun.

En tuta Italio la kunvenoj estis malpermesitaj. Nur okazis, surprize kaj kaŝe, unu kunveno en la urba ĝardeno de Milano, okazigita (ĉiam kaŝe) de la Soc. Partio (ne la Unuigita Soc. Partio). Ĝin partoprenis pli malpli 300 personoj. Polico alkuris ejen, kiam la kunveno jam estis finiĝinta.

Jen nur malmultaj el la okazintaĵoj. Pri tiuj, kiuj okazis en malgrandlokoj, malgrandurboj ktp. oni nenion scii povas. Sed certe tiuloke la laboristoj ne nur estis devigataj labori, sed eĉ devis tute ŝajnigi nescion pri signifo de tiu tago, alie okazus neevitebla persekutado, aŭ eĉ batado, hejmilara bruligo ktp.

Sed en la animoj tute ne estas forigita la signifo de la tago, kaj certe proksimestonte ni vidos grandan monoferon, okaze de la datreveno, por la perfortataj gazetoj, kiujn malutilegas finance la oftaj malpermesoj. *(3. V. 25.)*

La brita buĝeto

La buĝeto de la brita reakcia registaro ĵus disponas £ 800 milionojn. 44 proc. el tiu sumo estas necesaj por satigi ĉi-jare la ŝuldposedantojn kiuj sindoneme pruntis monon, dum trompitaj soldatoj krevas, putriĝas aŭ veneniĝas en militkampo. Pli ol 15 proc. subtenas la ŝip-, ter-, aer-armeojn. Subteno de la reĝa familio, policistaro, impostkolektistoj ktp. eluzas 11 proc. La militpensiulo ricevas 8½ proc. el la tuto. Edukado, sanzorgo, domkonstruado, la senlaboruloj kaj la maljunuloj kune kostas nur 13½ proc. Jen mondo taŭga por herooj!

Per lerta plano *Winston Churchill* pagigos al la laboristaro la koston de estontaj pensioj. La hundo nutriĝu per manĝado de sia vosto! *M. St.*

Kongreso de franca teknikista asocio Ustika

La 28.—31. marto okazis en Parizo la kongreso de Ustika. Menciinde estas, ke la rusaj teknikistaj asocioj sendis al ni telegramon, sciigante ke ili ne povis akcepti la inviton faritan al ili ĉeesti la Ustika-kongreson. Efektive la pasportoj estis al ili rifuzitaj de la franca registaro. Tio ankoraŭfoje pruvas al ni, kiel timas niaj registaroj la kontakton de la tutmonda laboristaro kun la rusa. En sia telegramo la rusaj inĝenieroj kaj teknikistoj kamaradece salutas la Ustikanojn. Tre interesa estas la fakto, ke niaj rusaj k-doj skribis al ni, proponante interŝanĝon de dokumentoj. Tiu propono estis, cetere, unuanime akceptita. Franca delegito de Ustika, k-do inĝ. Rej, jam vizitis Sovet-Rusion, por doni dokumentojn al la Ustikanoj pri la situacio de rusaj teknikistoj. La raporto de k-do Rej estas tute favora al Rusio kaj baldaŭ aperos broŝuro pri tiu temo. El la ĉapitro "Internacia agado" de la kongresraporto ni notas, ke Ustika vigligos siajn rilatojn kun samspecaj eksterlandaj organizaĵoj. Tiurilate, ni alvokas la k-dojn el ĉiuj landoj dezirantaj kunlabori per esperanto al tiu kunliga laboro, sin anonci al FEO, 177 rue de Bagnolet, Paris. — Kiam ni ricevos sufiĉe da kunlaborantoj, ni proponos al Ustika la efektivan praktikadon de esp. por internaciaj rilatoj; ĉar iu antaŭa kongreso jam voĉdonis rezolucion stariganta esp. sekretariejon ĉe Ustika. Tiu propono ankoraŭ ne efektiviĝis, sed la realigo dependas nur de ni.

El la rezolucioj akceptitaj de la kongreso ni citas la jenajn frazojn, kiuj bone lokigas "Ustika"n rilate al la tuta lab. klaso:

"La teknikistoj estas intelektaj laboristoj salajrataj, senpere batalantaj kontraŭ patronaro (mastraro), ekspluatitaj de tiu ĉi same kiel la laboristoj kaj oficistoj. Iliaj sindikataj organizaĵoj estas do ero en la aro de aliaj organizaĵoj de laboristoj salajrataj.

Laŭ nia scio tio jam estas realigata en Rusio, kaj Ustika estas preta, kiam la statutoj de iu konfederacio ĝenerala de laboro (kiu, ni esperas, baldaŭ unuiĝos) permesos tion, eniri en la kadron de tiu organizaĵo. Atendante tion, ĝi restas praktike simpla sekcio de la ĝenerala gruparo de laboristoj, per funda kunlaborado kun laboristaj sindikatoj. —

La ĝenerala sekretario de Ustika precizigas, ke ni ne volas direkti la lab. movadon, sed ke ni deziras oferi nian teknikan sperton al laboristoj organizataj por helpi ilian emancipadon —"

Jen kia estas la vidpunkto de la francaj teknikistoj Ustikanoj rilate al lab. klaso.

Ru 835.

Stato de virina laboro en Urala regiono

Komence de mondmilito pligrandiĝo de kvanto de laboristinoj en entreprenoj de Urala regiono estis samrapida, kiel en tuta Rusio. Ĉar en Uralo industrio estas precipe metalurgia kaj mineja, ni do vidas ĉi tie laboristinojn ne nur en teks-kaj kudr-produktejoj, sed ankaŭ grandan kvanton da ili laborantaj en uzinoj de metalurgia, mineja, kemia kaj alia industrio. Ili konsistigas kvalifikitan laborforton, kiu preskaŭ ekvivalentas laŭ laborscio kaj produktiveco al la vira. Lastatempe en fabrikoj kaj uzinoj aperas laboristinoj kun klereco mezlerneja, kiuj deziras ricevi laborsperton, necesan nuntempe por eniri en superajn lernejojn kaj laborfakultatojn.

Nuntempe en Uralo estas kalkulata ankaŭ granda kvanto de senlaboraj virinoj (6,753 laŭ statistiko por 1. okt. 1924).

Ĉi-subaj ciferoj karakterizas relativecon de laboristin-kvanto al ĝenerala kvanto de laboristoj kaj oficistoj en Uralaj sindikatoj.

Laŭ statistiko de 1. julio el 180,311 laboristoj, okupitaj en industrio, estas virinoj — 39,181 (21,7%); por 57,181 oficistoj 22,608 virinoj, aŭ 39,5%. El ĝenerala kvanto de laboristoj kaj oficistoj — 299,281 — virinoj estas 61,789, t. e. 20,6%. El la sama statistiko oni vidas, ke plej granda parto de virinlaboro estas aplikata en institucioj klerigaj kaj medicinaj, poste en teksindustrio 52,4% kaj en kudra — 45,5%.

Krom tiuj ĉefaj specoj de industrio, la virinoj laboras ankaŭ en termastrumado kaj konstrua industrio, kie procento da ili estas: en termastrumado — 30,6 kaj en la konstrua — 8,8%. Laboro de virinoj en termastrumado havas karakteron de sezona dungo por kampaj kaj legomĝardenaj laboroj. Laŭ sciigoj de sindikato konstru-laborista 1. julio el 8,948 homoj de ĝenerala kvanto de laboristoj kaj oficistoj — oni kalkulas 789 virinojn aŭ 8,8%. Post esploro de 8 entreprenoj kaj konstruaj laboroj montriĝis ke ĝenerala kvanto de laboristoj kaj oficistoj tie estis 1,725, el kiuj virinoj estis 278 aŭ 15%. En esploritaj entreprenoj ĉiuj virinoj estis okupitaj per helplaboro, plejparte kiel taglaboristinoj.

Jen do mallonge estas komuniko pri kvanto kaj distribuo de laboristinoj en produktado de Urala regiono. Rilate al cirkonstancoj de laborasekuro oni devas mencii samtempe kun pozitivaj flankoj ankaŭ la negativajn. La lastajn kaŭzas malfavoraj higienaj kaj teknikaj cirkonstancoj de laboro. Preskaŭ en ĉiuj uzinoj Uralaj estas rimarkebla konsumiĝo de konstruaĵoj kaj malprogreso de teknika muntado; ekzemple, — en teksfabrikoj oni havas malperfektan ventoladon kaj iafoje eĉ ĝian mankon, kio kaŭzas pro ĉiama granda kvanto da polvo en aero pligrandigon de profesiaj malsaniĝoj, ĉu en medio de laboristoj ĝenerale, ĉu en medio de virinoj precipe. En kelkaj fakoj de metalurgia industrio cirkonstancoj de virin laboro pro samaj kaŭzoj montriĝas plej malfacilaj.

Malfacilaj cirkonstancoj de virinlaboro en fabrikoj kaj uzinoj de Uralo kompletiĝas ankoraŭ per malbonaj loĝejoj ekster la loko de laboro. La loĝejoj, en kiuj virinoj pasigas libertempon, estas rimarkindaj per multaj mankoj, el kiuj ĉefaj estas jenaj: malsufiĉeco de aero, malperfekta aŭ tute mankanta ventolaĵo, malvarmo kaj humo en loĝejoj dum vintra tempo.

Notinte ĉiujn negativajn flankojn de cirkonstancoj por virinlaboro en Uralo, kiuj plej parte devenas el malbonstato, kiun travivas nia respubliko kaj forigo de kiu venos post plena restabiligo de ekonomia bonstato landa, ni devas ankaŭ atentigi pri pozitivaj flankoj, kiuj entute estas rezultoj de l' efektivigita praktike leĝaro pri virinlaboro. El tuta nombro de tiuj konkiroj ni citu jenajn: dungo de virinoj por laboro estas farata samrajte kiel tiu de viroj; forpermeso de laboro precipe de l' gravedaj post 5-a monato, estas farata nur en maloftaj okazoj kaj nur post ĉiuflanka konsidero de kaŭzoj forpermesigaj kaj ankaŭ kun konsento de laborinspektoro; salajro estas kalkulata sendifere ĉu al viro, aŭ al virino, atentante ilian kvalifikitecon kaj karakteron de laboro; ĝenerala regularo pri asekuro de virinlaboro, kiel ekzemple: libertempo pro gravedeco, foriro dum laboro por nutrigo de infano, — estas plenumataj senescepte; supernorma kaj nokta laboro por virinoj estas permesata nur en ekskluzivaj okazoj, precipe ti-kiam laŭ karaktero de produktado ne estas eviteblaj noktaj laboroj kaj kiam ilia malpermeso signifus maldungon de virino. En multaj uzinaj entreprenoj de Uralo, ekzemple: en asbestaj minejoj, en magnezia uzino kaj al atentante specifikecon de produktado, por virinoj estas ellaborita specimeno de speciala vestaĵo, responda al ilia fiziologia origino.

Celante rekreon de viva kvalifikita laborforto, en Uralo, kiel en aliaj lokoj de Sovet-Unio, ekzistas en ĉiu aparta industrio t. nom. "procenta rezervo" de gejunuloj, kiujn oni kalkulas relative al kvanto de ĉiuj laborantoj en entreprenoj. Ĉi rezervo en Urala regiono estas jena:

Speco de industrio	Ĝenerala kvanto de laboristoj		Kvanto de gejunuloj		Proc.
	viroj	virinoj	viroj	virinoj	
Ledlaboristoj .	3907	927	244	48	6,04
Teksistoj	2169	2895	205	199	7
Paperlaboristoj	1499	520	88	34	6
Minlaboristoj .	20835	4305	1100	407	5,97
Lignolaboristoj	1343	253	74	7	3,53
Kemiistoj	3663	725	152	49	4,6
Presistoj	650	226	77	10	9,9
Fervojistoj . . .	amb. seks. 23750		amb. seks. 914		3,85[1])
Laboristoj de loka transporto	amb. seks. 947		amb. seks. 3		5
Metalistoj . . .	statistiko mankas				
Konsumlab-oj .	6450	659	177	22	3
Konstrulab-oj .	7770	479	174	22	2,2
Laboristoj de popola kunligo	2761	1028	15	9	0,6
Ter-arb-lab-oj .	11060	1785	519	156	8,2

[1]) trograndigita.

Samcele, t. e. por pligrandigo kaj perfektigo de rezervo de kvalifikitaj laboristoj preskaŭ en ĉiuj pli grandaj fabrikoj, uzinoj kaj entreprenoj estas fonditaj t. n. lernejoj de fabrik-uzina lernantaro (fabzavuĉ) kaj lernejoj profesi-teknikaj. Ĉi suba tabelo mallonge sciigas pri kvanto de junulinoj, kiuj lernas en plej grandaj lernejoj de sama speco:

	Kvanto de lernantinoj
Profesia lernejo je la nomo de Lenin .	35
Aramilskaja de F.U.L. (fabr. uzina lernant.)	30
Ŝadrinskaja	15
Ekaterinburgskaja kudr. profes. . . .	65
Permskaja kudr. profes	30
Verĥ.-Hejvinskaja F. U. L.	12
Nadeĵdinskaja de F. U. L.	15
Lisjvenskaja de F. U. L.	30
Asbestovskaja de F. U. L.	15
Entute en ĉi lernejoj troviĝas da junulinoj	244

Kiel oni vidas el tabeloj, kvanto de junulinoj relative al „procenta rezervo“ de junuloj, en ĉiuspecaj notitaj lernejoj estas tre malgranda por tia granda laborregiono, kia estas Uralo; ĝi do ne estas kontentiga. Klarigi la kaŭzojn estas malfacile, oni povas supozi, ke en tiu rilato havas signifon cirkonstancoj de ekzistado, familiaj aŭ iuj aliaj.

Nuntempe ĉe Urala Regiona Fako de Laboro estas organizita komisiono por studi kaj plibonigi la cirkonstancojn de virinlaboro. La komisiono jam fakte komencis laboron kaj havas sukceson bonan. Konsiderante energian laboron kaj ĝustan vojon, kiun elektis komisiono, oni povas esperi, ke en multaj kazoj ĝi sukcesos forigi malfacilajn por laboristinoj cirkonstancojn de laboro.

Elrusigis *G. Agry*

La grenpolitiko en agrara Rumanio

La nuna ekonomia politiko de l' liberala reganta registaro kaŭzis tion, ke en multiuj lokoj de ĉi-agrara ŝtato la registaro ordonis kaj konstatis tagojn, dum kiuj estas malpermesate, ke la panistoj baku kaj vendu panon. Ekz.: en Timiŝoara, en mezo de Banato, kiu estas unu el la plej grenkreivaj partoj de Rumanio.

La pasintjara grenrikolto estis nekontentiga, kaj tamen la registaro donis al la liberaluloj permeson por eksporti grandkvante la grenon. Malgraŭ tio, ke jam printempon pasintjaran fariĝis publika, ke la rikolto estos nesufiĉa, la liberaluloj eksportis pasintjaran printempon 1103691 tunojn da greno je valoro de 5462 milionoj da leoj. — En 1923, en sama sezono estis eksportitaj 976771 tunoj je valoro de 3580 milionoj da leoj. — El la eksportita greno tritiko estis 120945 tunoj kaj tritikfaruno 89946 tunoj. —

La eksportitaj tritiko kaj faruno estas sume 210441 tunoj. — Se tiu ĉi kvanto ne estus eksportita, ni ne devus manĝi en ĉi-Kanaano anstataŭ pano: maizaĵon[1])! Se ni dividas ĉi-kvanton, ni povas konstati, ke la tutlanda loĝantaro seniĝis po kapo je 134 kg. da ĝi. —

Pro tiu ĉi eksporto ankaŭ la grenrezervo de 1923-jara rikolto estis konsumita, kaj jam en oktobro 1924 estis konstatita, ke finkonsumiĝis la nova rikolto! —

Laŭ la liberaluloj ĉi-eksporto estis necesa por plibonigi nian valuton. Okazis la malo. Por doni klaran bildon pri la ekonomia dekadenco de Rumanio, mi donas kelkajn statistikojn: En la antaŭmilitan Rumanion en 1913 oni importis 1374 tunojn, aŭ pokape 0,2 tunon. En 1923 en la pligrandiĝintan landon 703000 tunojn, aŭ pokape 0,1 tunon. Oni eksportis en 1913 — 4569 tunojn, pokape 0,65 tunon, en 1923 — 4878 tunojn, pokape 0,29 tunon. En 1913 la eksporto estis ankoraŭ aktiva, alivorte la eksporto valore preterpasis la importon, depost 1920 ĝi estas pasiva, t. e. la importo estas pli granda ol la eksporto. *1762.*

1) Anstataŭanta panon kuiraĵo el maizfaruno.

RUĜA HELPO

Kontraŭ la fimortigado en Bulgario

Al ĉiuj proletarioj kaj kamparanoj, la junularo, la virinoj kaj ĉiuj amikoj de la laboruloj! — Al ĉiuj membroj de la Ruĝa Helpo!

Kamaradoj kaj civitanoj!

La laboristoj kaj kamparanoj de Bulgario ree trapasas penigajn suferojn.

En la lando de l' plej terura blanka Cankov-teroro furiozas post la senfinaj teruregaĵoj denove sanga buĉado.

La sciigoj venantaj el Bulgario parolas pri nepriskribebla teroro kaj kruda perfortado de la laboristaj masoj, kiuj estas plenumataj de la kanajlaj bandoj de Cankov post la eksplodo en la katedralo de Sofio. En la tuta lando la malliberejoj estas troplenigitaj je miloj da laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj (inter ili grandamase virinoj kaj infanoj, laŭ eldiroj de la tie ĉeestantaj anglaj parlamentanoj).

En malliberejon oni ĵetis ĉiujn ti-kiuj ne komprenis indiferente rigardi al la teruraĵoj de la Cankova teroro. Tie ili estas plej kruele turmentataj. Centoj da kaptitaj viroj, virinoj kaj gejunuloj, kiuj tute ne havas rilatojn al la eksplodo en la katedralo de Sofio, estas beste persekutataj de la trupoj kaj la polico.

La tempo de la Bartolomeaj noktoj enfalis super la sendefenda kaj nearmita loĝantaro de Bulgario.

La vivo de la plej bonaj filoj de Bulgario estas en danĝero. Ree miloj da familioj perdas siajn perlaborantojn. Miloj da malfeliĉaj infanoj perdas siajn patrojn kaj estas liveritaj al la sorto. La sennombraj masoj da vidvinoj kaj orfoj, kiuj post la masmortigado de septembro 1923 estis senhelpaj kaj donitaj al la pereo, nun pliiĝis je novaj miloj.

Estas devo sankta de l' proletaro, de l' kamparanaro kaj de ĉiu unuopa juston amanta homo, laŭtigi sian voĉon kontraŭ tiuj ĉi teruraĵoj kaj tien celi, devigi la ekzekutistojn en Sofio, ĉesigi la frenezan buĉadon, savi al miloj la vivon kaj redoni al la kaptitoj la liberecon.

Temas pri la vivo de multaj miloj da senkulpaj viktimoj, kiuj falis en manojn de murdistoj.

La „Ruĝa Helpo“ alvokas ĉiujn protesti kontraŭ tiuj ĉi politikaj murdoj kaj la sovaĝa teroro de Bulgario kaj samtempe ankaŭ defendi la elsangadantajn popolamasojn de Bulgario.

Pereu la ekzekutistoj kaj murdistoj de Sofio!

Pereu la faŝismo!

Manojn for de la laboristoj kaj kamparanoj de Bulgario!

Vivu la internacia unueco de la laboruloj!

Vivu la Internacia Ruĝa Helpo!

La Ekzekutiva Komitato de I. R. H.

DISKUTEJO

Kiel plifortigi la SAT-vicojn?

K-do 2921 skribis interese. Estas sendube ke ĉi tiu demando pri la pliformigo de la SAT-vicoj devos esti prikonsiderata, ĉar, se ni deziras akiri bonan rezultaton el nia laboro, ni bezonas bonan organizaĵon por niajn laboron kaj agitadon direkti kaj kontroli. La nuna organiz-metodo, tiu de anoj ligataj principe senpere al la Centro, eble taŭgas tie-kie troviĝas unu ano en unu urbo. Sed kiam troviĝas pluraj anoj en unu urbo ŝajnas al mi, ke estus plibone ke ili organiziĝu tie en branĉon, kiu prizorgus iliajn agadojn ktp. multe plibone ol izoluloj renkontiĝantaj kiel grupo kiu havas nenian kolektivan kontrolon super la apartaj faroj de la anoj: Grupo tiaspeca ne estas organizata, ĝi similas al societo de filozofoj. La ligilo de mem-disciplino mankas, ĉar ĉiu ano estas “leĝo al si mem“. Alivorte, ŝajnas al mi ke la tempo pretas por serioze ekkonsideri la organizan problemon kun la celo haltigi la unuopemecon ĉe kelkiuj. Troviĝas la kontraŭdiraĵo inter la ekzisto de “izole“ “organizata“ ano kaj la ideo de sennacieco kiu baziĝas — plimalpli — laŭ interpreto de la modernaj civilizitaj kondiĉoj; rekoninte la fakton pri maŝin-interdependeco de homo al homo.

Kompreneble, mi konstatas ke estas absolute neeble unuigi divers-tendencajn prolet-esp-istojn en bone funkciantan grupon; eĉ ne estas dezirinde. Tamen, la komuna intereso pri la lingvo troviĝas kaj persistas kaj kunigas praktike divers-tendencajn prolet-esp-istojn je lingvaj aferoj. Sed konsideri oni devas la necesecon pri fakisma por- kaj peresp. laboro. Jen troviĝas bazo, laŭ kiu oni povas organiziĝi: troviĝu grupoj por la diversaj tendencoj, kaj ili agitadu en sia propra sfero. Propagando laŭ granda skalo; propagando sen konsidero pri tendenco estas neebla, kaj estas vane atendi aŭ celi kuniĝon de

diverstendenculoj al esp-propagando en lokoj kie la politika situacio fariĝis akra ĉe la proletaro. Alivorte, ni konstatu la fakton ke la politika koncepto de la aparta ano determinas lian agadkampon kaj rilaton al alitendenculoj. La politika subfluo devas esti ĉiam konsiderata.

Pro la fakto ke ne troviĝas politika akordiĝo, estas neimageble ke troviĝu "unuecfronto" rilate al esp-propagando. Speco de unuecfronto estas pensebla, sed ĝi ne signifas ĉiam — eĉ politike — solidan, nerenverseblan fronton pro la fakto ke ĝi estas unuigita, t. e. konglomeraĵo da malsampensantoj interne de donita cirklo. La sperto montras ke unuecfronto estas bela revo kiu signifas nur konstaton pri organiza malforteco; bela revo de tiuj kiuj sopiras je "pli bonaj tagoj". Sed la sopiroj estu for. Oni ekzamenu la kaŭzojn de tiu organiza malforteco. Estas klare ke ĝi troviĝas pro la diverseco de vivkondiĉoj kaj pro la sekva diverseco kaj manko de politika, klasa klareco. Tiu-ĉi sin trudas tra la tuta Lab.-movado, la esp-sekcio ne faras escepton.

La fakan laboron ni devas antaŭenpuŝi: neniu alia vojo troviĝas al solvo de la diverstendenca problemo. Sen voli fari insulton, estas tutklare ke komunisto ne laborus kun anarkisto kaj inverse, nek marksisto kun social-patrioto. Ni ne plu caŝu iluziojn: tio ne estas "unueco", ĝi estas frenezeco. Tamen, la metodo de politike neŭtrala organizado devus esti trovebla inter prolet-esp-istoj, ĉar la fakto pri fakismo devigas al ni la konstaton ke, por sukcese propagandi ĉe unu fako, oni bezonas ĉiujn haveblajn detalaĵojn ktp. pri ĉiuj aliaj fakoj. — Tiu ĉi estas la malfacila afero, afero nepre diskutinda kaj solvota: kiel alvenigi interkonsenton ĉe la diversaj tendencoj pri eldonaĵoj, jarlibroj ktp. en la nuna infanecperiodo de la organizaĵo? "Unuecfronto" laŭ tiu principo estas dezirinda, sed precize en tiu ĉi "unuecfronteco" troviĝas la malfacilaĵo: oni devus prikonsideri kaj pricedi sektemajn interesojn, — situacio kiu estas tute netrovebla en solide konstruita org-aĵo, t. e., en org-aĵo kies anaro sampensas pri ĉiuj esencaj demandoj.

Do, ni rekonu la ekzistantan sektemecon. Ni pro tio laboradu fake, sed perdu neniun ŝancon por la akordiĝo kiu rilatas al la esp-movado kiel tuto.

Bone memoru: la vivkondiĉoj alproksimiĝas pli malpli rapide al unu progresiva nivelo. El tio ni ne nur povas konfide atendi unu vidpunkton pri bazaj demandoj, sed devas ĝin priagitadi. Tial, la principo priparolita de Kolĉinski pri ununureco de esp-org. ne estas entute nediskutinda. Kontraŭe. Ni rekonu ke la nuna sektemeco cedos al solideco; ke nun, en la ĥaosa periodo oni revas pri "unueco", kiam alie ĝi devus studi kaj kompreni la kaŭzon de la ĥaoso kaj elhaki vojon al Ordo. Alivorte, la demando estas scienca demando, ne sentimenta afero. Tiu, kiu komprenas la situacion, ne sin ĝenas pri "unueco" kiu nur estas iluzio: li celas la forigon de "unueco"; de konglomeraĵo de ujigitaj malsampensantoj kaj la starigon de unu solida, integrala organizaĵo.

Kaj tiurilate troviĝas la demando pri la naci-org-aĵoj. Ilian ekziston oni povis kompreni antaŭ la naskiĝo de sennacieca org-aĵo. Sed nun, kiam ekzistas la lasta, kial ilin ni vivigadu? Kiel eraro ili estas persistemaj. Kaj la sensencaĵo pri varbado „unue al nacia-org., due al SAT" estas absolute ridinda, — por diri nenion pli. La fakto ke naci-org-aĵoj ekzistas, devigus al SAT, kiel funkcianta korpo, la taskon disciplini tiujn el siaj anoj kiuj tenas anecon en aliaj esp-asocioj kaj igi ilin cedi tuj tian anecon. "Oni ne povas labori al du mastroj." Per tiu ago la Asocio eble perdus kelkajn membrojn — sed tio nur montrus ke ili ne valoris al SAT kaj ke ili enrampis sub pretenda masko.

Ĉi-kune mi donas al la konsidero de la anoj skizon pri nova organizmetodo kiun mi pripensis. Laŭ ĉi-propono la sektoroj estas nuligataj pro la konsidero ke la Homaro sub la Estonta Sociordo ne estos arbitre organizata sektore, sed realece laŭ Industrio. Tiu-ĉi estas fundamenta konsideraĵo. Krome, la propono enhavas la postulon pri konkreta organiziĝo, kiu devigas memdisciplinon kaj ordigitan kunagadon ĉe la membroj. En la nuna tempo, por konservi la unuecfronton t. e., la politike malsamtendencajn anojn, mi pensas ke oni povus organizi la ĉefojn de la diversaj tendencoj ĉe la Sennacieca Administrejo (S. A.) kiu povus esti en unu urbo, kie presado ktp. povus esti plejbone farata. La ĉefo(j) de unu tendenco havigu al si la detalaĵojn pri progreso ktp. ĉe la aliaj tendencoj kaj transdonu al siaj propraj anoj. Malakordo ne okazus el tio.


La skizon oni legu jene: — Lingva Regiono (L. R. Fig. 1) havu apartan gruparon kun, a) senpera interrilato inter ĉiuj: b) senpera interrilato al la S. A. (v. Fig. 2.). L. R. (Fig. 3), kun diverstendencaj grupoj ligataj al S. A. kaj al samtendencaj grupoj en alia(j) regiono(j). (v. Fig. 4). La organizigo de unuopaj anoj, ĉu urbe, ĉu regione, laŭ la sama principo kiel la grupoj.

Laŭ mia opinio, per tiu organizmetodo ni povus konservi tiun unuecfronton kiun ni nun havas, malgraŭ ĝiaj malperfektaĵoj kaj malbonaĵoj, ĝis ni povos plibonigi ĝin aŭ inteligente forigi se necese. Estas memkompreneble ke ni devas ion fari, ĉar verŝajne ni plimalpli frue perdos ĝin, se ni persistas je nia nuna agado. La fondiĝo de TLES estas ekzemplo de tio kio eble okazos ĉe aliaj tendencoj.

Mi aprobas la ideon pri Universala Asocio de Lab. Esp-istoj ĉar ĝi akordiĝas al la celo de la lab.-movado mem: la Universala Respubliko de l'Produktantoj. Sed ĵus pro tio mi deziras konservi la nunan Universalan Asocion (SAT) kontraŭ detruo per malpacetoj inter malsamtendenculoj: okazo kiu nepre plaĉus al la burĝaro. Nur pro tio mi celas la forigon de la naci-org.-aĵoj, — almenaŭ ni malebligu al SAT-ano ke li tenu anecon ĉe naci-org-aĵo. Se tiu-ĉi emo al apartaj tendencasocioj persistas, la lab. esp-movado relative malfortiĝos.

Mi submetas tiun-ĉi proponon al la membroj kaj deziras ke oni faru kritikojn, por ke ni ĉiuj povu trovi bonan kaj sanan organizformon kaj principon.

D. Sherriff (1100).



Gruptendenca SAT Organizo

Ĉi-sistemo celas konservi la unuecon ĉe la prolet-esp-istoj. Pro tio, ĝi baziĝas laŭ tendenco kaj konforme agadas. Oni legu jene: — La malgrandaj cirkloj (Fig. 1) signifas urbgrupojn interne de Lingva Regiono (L. R.), montrata per intermita cirklo. La grupoj de unu L. R. havas senperan rilaton inter si laŭ la firmaj linioj. La intermitaj linioj de la grupoj (Fig. 1) senperas al Sennacieca Administrejo (S. A.). Fig. 2 montras per la firmaj linioj la senperan rilaton inter la urbgrupoj kaj la S. A.; la intermitaj linioj la senperan intergruprilaton. Tiu ĉi estas la simpla formo. Tiu ekzistus (teorie) se ĉiuj sampensus.

Fig. 3 montras kvar diverstendencajn grupojn en unu L. R. Ili ne rilatas — escepte memvole — inter si, sed senperas al la S. A. De S. A. ili peras al samtendencaj grupoj en alia L. R. (Fig. 4), kaj senperas de L. R. Fig. 4 ree al si mem. La metodo samas por individuoj ĉu urbe ĉu regione.

TRA LA KLASBATALO

En mino Dorstfeld (Ruhr-regiono) okazis granda katastrofo per eksplodo de dinamitaĵoj. 44 minlaboristoj perdis la vivon, 27 estas pli malpli grave difektitaj. La plioftiĝon de tiaj teruraj akcidentoj kaŭzas la manko de la sekurec-instaloj kaj la senindulga ekspluatista sistemo.

Transportlaboristoj en Danio komencis striki.

En Rejnlando okazas konstrulaborista striko. Estas raportate pri kunpuŝiĝoj inter strikantoj, strikrompantoj kaj polico.

Dum la enterigo de l'franca generalo Mangin laboristoj per mokoj, krioj kaj fajfoj ĝenis la ceremonion. La burĝoj kaj oficiroj ne riskis kontraŭagi.

Francaj trupoj antaŭenmarŝas en Maroko.

Sur la insulo Hawaii (Pacifika Oceano) estas esperantista kamarado, Paŭlo Crouch, soldato de la usona armeo, kondamnita de militjuĝejo je 40 jara mallibereja puno pro „studado kaj instruado de esperanto, pro simpatieco al Sovet-Rusio kaj ĉar li penis organizi komunistan ligon en Hawaii". Lia kamarado kaj kunaganto ricevis punon de 26 jaroj da punlaboro! Detalojn pri la neaŭdita monstra terurajô ni raportos en venonta n-o.

DIVERSAĴOJ

La interesa dokumento

Kredeble multaj memoras la jurnalon rusan "20 vjek" (esper. lingve "20-a jarcento"). Ĝi aperadis dum carreĝimo en Rusio. Enrigardante n-on 20 de ĉi-jurnalo por aŭgusto 1912, ni povas vidi en la fako "El historio de moraroj" unu malgrandan noton-artikoleton. La artikoleto sciigas, ke en multaj urboj germanaj, precipe en Prusa Silezio, — en preĝejoj kaj kapeloj sub la ikonoj de "Savinto" ekzistas tre interesaj surskribaĵoj. En XI—XIII j. c. la pastraro per tiuj surskribaĵoj volis pruvi por imperiestroj germanaj superecon de l'eklezio super potenco monduma. Nune ĉi-skribaĵoj estas havantaj la gravecon, ĉar ili ankoraŭfoje pruvas, kiel popoj, rabenoj, pastroj, ksendzoj k. c. aplikas diversajn rimedojn, elpensadas diversajn historiojn por eksciti la religisenton. Sciante, kian rolon ludadis en tiu tempo rangoj kaj titoloj – la servistoj de l' eklezio surskribadis sub la ikonoj de sia dio jenon: "La grandsanktega plejsaĝegulo-helegulo, plej nevenkebla regnestro kaj grandsinjoro Jezuo Kristo, vereca dio, kronita imperiestro de ĉiela ŝafaro, elektita regnestro de Siono kaj de l' tuta tero, por tutaj tempoj pligrandkvantigisto da sanktuloj, sola pastrestro kaj ĉefepiskopo, kurfjursto (t. e. elektprinco) de vero, arkiduko de honestuloj, duko de amo, margrafo (markizo) Jeruzalema, burggrafo (kastelestro) Galilea, princo de mondo, grafo Betlehema, barono Nazareta, ĉefa estro de l' eklezio katolika, kavaliro ĉe pordegoj inferaj, venkinto de morto, majstro de sankteco, grandpatrono de ĉiuj orfoj kaj malriĉuloj, de patro ĉiela kaj dio la plej proksima kaj fidelega konsilanto, nia la plejfavora sinjora dio, Jezuo nia grandordonanto."

Parolante pri dio kiel "regnestro ĉiela", oni aldonadis al tio ankoraŭ ĉiujn titolojn superajn terajn, ĉar oni povas la simplan popolon pli facile trompi kaj obeigi, se oni timigas ĝin per tiaj timigaj nomoj kiuj personigas la premadon teran, ekspluatadon, perforton, se oni rangigas dion pli alte ol ĉiujn terregnestrojn kaj nobelojn. (El "Bezboĵnik" (marto 1925) trad. *M. V.*)

Jen per kiaj rimedoj kaj iloj subteniĝas tutaj religioj, ne laste — la kristana! Laboristaro kaj vilaĝanaro vidas sur la tero la timigajn rangojn kaj titolojn, kaj en "alia mondo", en la "ĉielo" devos timi, subiĝi al "ĉielaj imperiestroj, princoj, grafoj kaj similaj nobeloj". *M. Viktorov* (3983).

Tom Mann kaj Esp. (Elĉerpo el letero).

„Estas bonega afero, kiu ŝajnas tre kredebla, ke post malmultaj jaroj mondlingvo estos uzata ĝenerale ĉe internaciaj konferencoj. Mia aĝo malpermesas ke mi partoprenu, sed la afero plaĉegas al mi".

Ankaŭ *Robt. Smillie* skribis: "Kvankam mi mem ne akiris la lingvon, mi tre inklinas doni ĉian ŝancon por ĝia lernado. Persone mi tre ŝatus ke Esp. estu instruata en niaj lernejoj".

Internacia Tramista Konferenco

La Internacia Transportlaborista Federacio okazigos de 18.—20. julio en Bruselo internacian tramistan konferencon, en kiu estos reprezentataj 165 000 tramistoj, kiuj apartenas al la asocioj tramistaj aligitaj al la ITF. Traktotaj temoj estas: La demando de l' unuvira vagono; leĝaj reguloj por la tramoj, etfervojoj kaj por la aŭtobusaj entreprenoj en la diversaj landoj; fervojaj kaj tramvojaj problemoj rigarde al la evoluo de l' aŭtotransporto; unuecigo de la tramvagonoj kaj ilia instalo; speco de la entreprenoj kaj speco de la funkciado de tramoj kaj etfervojoj kaj de aŭtobusaj linioj en div. landoj; agadprogramo por tramistoj.

Tutblankrusa Konferenco de Esperantistoj (SEU)

28.–30. majo 25

Programo

28. matene — kun ĉiuj delegitoj Ekzameno ĉe unuaj regnaj esp-aj kursoj.
Vespere — festa malfermo de konferenco, jubilea festo de C.O.B.F.S.E.U. kaj ellaso de esp-aj instruktoroj (el kursoj).
29. matene — Labora kunsido, posttagmeze, ankaŭ.
Vespere — Esp-a Spektaklo, — Inter la kunsidoj estos kunsidoj de la Komunista Frakcio, kaj SAT-anaro.

Dum konferenco laboros:
1. librovendejo "Esp-a", kie oni akceptos ankaŭ abonojn al "S", "SR" ktp.
2. Esp-a Ekspozicio
K-doj sendu materialojn!

Fotojn, diagramojn, leterojn, poŝtkartojn, esp. gazetojn, aliajn esp. eldonaĵojn, ktp.

Por aliaj detaloj oni sin turnu senpere al la Konferenca Sekretario, k-do *Snejko, D.* Sovet-Unio, B.S.S.R., *Minsk.* Poŝtkesto 33.

KRONIKO

Aŭstrio.

Wien. Okaze de la festo de 1. majo la vienaj esp. laboristoj en kelkaj grupoj partoprenis la demonstracion. La ĉefgrupo de ALLE kunmarŝis kun 2 diafanbildoj kaj 3 standardoj. Sur la urbdoma placo parolis k-do Klatil. En kunveno de la 2a distriktgrupo de la "Naturamikoj" faris esp. lumbildparoladon pri Italio k-do Ĉech. Fondiĝis *Esp. Sekcio de la Turista Unuiĝo La Naturamikoj.* K-doj — naturamikoj estas petataj sendi siajn adresojn al sekr.: *A. Klein, Wien II,* Pazmanitengasse 10/21.

Francio.

Lyon. — La 1. majo, multe da laboristoj ĉiuprofesiaj strikis. Pli ol 40 000 strikatestaĵoj estis disdonitaj ĉe sindikataj dejoradejoj. Posttagmeze okazis granda manifestado kiun partoprenis, malgraŭ malfavora vetero, pli ol 15 000 gelaboristoj. La Lab. Esp. Grupo kun granda verda flago kaj grandlitera afiŝo sur kiu oni legis "Laboristoj, ni lernu Esperanton" faris multe da propagando, 45 esp. k-doj kantis la "Internacion" en unu sola lingvo kvankam ili estis el 7 landoj. Fine de l' manifestado, okazis granda mitingo. 4 tribunoj estis instalitaj. Ĉe la 3a post la enskribitaj oratoroj, k-do Roux parolis pri esperanto kaj sindikata tutmonda unueco. Tio tre efikis en la publiko, ĉar estis varbitaj miloj da simpatiuloj. Multaj broŝuroj kaj lernlibroj estis tiel venditaj. Jen imitinda ekzemplo: k-doj, ĉiam profitu gravajn mitingojn kaj manifestadojn por klarigi al multe ĉeestantaj laboristoj la kialon de nia movado. *132.*

Germanio.

Barmen. Lab. Esp. Grupo estis fondata ĉi tie kun 14 laboristoj. Inter ili okazas komencantkurso. Instr. k-do Wieditz, Elberfeld. Kunveno ĉiulunde je 7a vespere en lernejo Brucherschulstr. *821.*

Nederlando.

La Ned. Fed. de Lab. Esp. okazigas la 1. junio en Hilversum (ejo: De Harmonie, Heerenstr.) sian 10an jarkunvenon.

La tagordo enhavas i. a. ĉi suban proponon de sekcio Amsterdam: La Federacio fondu Intern. Lab. Esp. Asocion laŭ la starpunkto de nia Federacio[1]) kaj petu al alilandaj Asocioj aliĝi al tiu Internacio.

Polio.

Boryslaw. Pro ofta migrado de la laboristoj de petrola pola distrikto al div. landoj samindustriaj, esp. movado bone prosperas en B. Finmaje la grupo esperas aranĝi esp. tagon kun stratvendado, manifestado kaj ekspozicio. Grupo alvokas ĉiujn favorajn lab. grupojn, ke ili sendu al ni ekspozician materialon, propagandilojn, ornamaĵojn ktp. Dum 1. maja festo okazis esperantlingva parolado sur ĉefurba placo. Estis akceptitaj du salutleteroj al la laboristoj kaj al la lab. gejunularo de la tuta mondo. *B. Czechowski*

Sovet-Unio.

Dolinskaja. 1. majo Dolinska esp. rondeto (Ekaterinoslav. gub.) aranĝis la manifestadon sub sia propra ruĝa standardo kun la verda kvinpinta stelo kaj devizo: Proletarioj de la mondo, unuiĝu! Rondetanoj kunvenis apud stacidomo, de kie oni ekiris per belformaj vicoj tra la ĉefstrato de l' kolonio al la teatro, kantante la Marŝon de la laboristo. en esperanto. Ĉiuj rondetanoj havis espsignetojn, speciale preparitajn por ĉi-tago. En la teatro, kien kunvenis ĉiuj partiaj kaj prof. org.-aĵoj, antaŭ la malfermo de la solena kunsido, laŭ propono de unu rondetano estis kantata "Internacio" en esp. — Dum posta mitingo k-do N. Aleksandrov faris publikan paroladon es esp. Je 1. majo ankaŭ aperis unua numero de murgazeto "Esperanto". *N. A.*

Ufa. Post longaj malhelpoj ni sukcesis organizi esp. laboron grandskale. Ni raportadis dum febr. kaj marto en jenaj organizaĵoj: 1) I-a urbrajona kunveno de komjunularo; 2) same — en II-a rajono; 3) ĉe kunveno de ledaj-laboristoj; 4) ĉe kunveno de komjunularo en fervojmetiejo; 5) ĉe kunveno de Ufa fervoja instruistaro. Rezulte

---

1) N. F. d. L. E. estas laŭ statute neŭtrala, ne staras sur klasbatala starpunkto. Rap.

MINSKA DISTRIKTA KOMITATO

de

Internacia Laborista Helpo

petas ĉiulandajn samideanojn kaj ĉiulandajn fakojn de I. L. H. sendi leterojn, artikolojn kaj korespondaĵojn pri

1. laboro kaj disvastigo de ILH-organizaĵoj
2. situacio de k-doj kiuj troviĝas en malliberejoj
3. blanka teroro kaj pri aliaj demandoj ligitaj kun ILH-laboro.

Adreso: Sovet-Unio, Blankrusio, Strato Engelsa Okruĵnoj Komitet MOPR'a (I. L. H.)

oni organizis 9 ĉeletojn de SEU, sume 79 anoj. Kursoj funkcias 2-foje ĉiusemajne po 2 horoj (merkrede kaj dimanĉe). 12/IV. estis organizita urba komitato de SEU. Varbado por SAT komencas post plua progresado de la elementaj kursoj. *O. K.*

RECENZEJO

Gazetoj

Ligilo por vidantoj. — *Oficiala informilo de Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj: UABE. — N-o 1. Jaro 1925. — Kvaronjara, 16 paĝa gazeto. — Abonprezo: 4 svis. frankoj; senpaga por la subtenantaj membroj de UABE. (kotizo laŭvola). Sekretario (ricevanta la recenzotajn librojn, interŝanĝgazetojn) s-ro Victor Hendricx, Roosendaalstraat 148, Vorst-Brussel, Belgio. Trezoristo (ricevanta la abonojn kaj aliĝojn): s-ro W. Percy Merrick, Penso, Shepperton, Anglujo.*

Ĉi tiu gazeto estas neŭtrala, sed precipe faka. Grave estas, ke UABE estas la nura internacia blindulasacio: tial en ĝi jam ekestis aŭ al ĝi aliĝis interesaj subfakoj, kiel MBM (Mondunuiĝo de Blindaj Muzikistoj), IBIS (Internacia Blindulafera Informejo kaj Statistikejo), la kunligo de la blindaj metiistoj, ktp. Krom ĉi tiu *ligilo*, nigrepresata por la vidantaj blindulamikoj, UABE havas oficialan porblindulan Braille-presitan gazeton, t. e. la jam dudekjaraĝa "Esperanta Ligilo", fondita de Cart. Kune kun la programa artikolo, el kiu mi eltiris la suprajn informojn, ĉi tiu unua kajero de L. p. V. enhavas prozaĵojn kaj poemetojn de blinduloj (tre bela ŝajnas al mi „Lasta rozo" de Rosine Bauer), kaj la listojn, de la UABE-estraro, kaj de la UABE-konsuloj (po unu el dudekkvar nacioj, kaj po du el kvar, t. e.: Aŭstralio, Francio, Japanio kaj Rusio.

SAT-ano 532.

Represis el Senn: *The Freethinker*, London, 19. 4., Antikrist. mov. en Ĉinio (S. 25), *La Protesta*, Buenos Aires, 27. 3., Remem. de Ribelulo (S. 21), *A Vilag*, Targu Mureŝ, 1. 5., Burĝa aritmetiko (S. 26), Germ. policsovaĝ. (S. 27), Striko de jun. en Fr. (S. 28). *Le Journal du Peuple*, Paris, 1. 5., Voĉo el Polio (S 24). Ŝtata laborservo (S 25), Mod. virino en Ĉ. (S. 27), Labmovado en Jap. (S 28).

Enpresis div. notojn: *Schles. Arb.-Zeitung*, Breslau, 22. 4., peresp. let. el Rusio. 9. 5., majsaluto el Lond. *Sächs. Arb.-Zeitung*, Leipzig, 1. 5., 8. 5. let. el Lit. kaj Sovetio per Kom. esp. informservo.

La SAT-propagandisto (N-oj 1, 2), Red. k. Adm. *Den Helder*, Nederlando. Folieto 2-paĝa, ĉiumonata, por la SAT-propagando en Nederl. (hektografita). — Tre laŭdinda ago de niaj varbemaj k-doj en Nederl., pro kio ni kore gratulas ilin!

Libroj

Batalantoj por la homara paco, *Dro. Winfried Fricke.* 25 pĝ. Form. 23½ × 15½. Prezo: 0,40 mk. Eldonejo La Batalanto, *Hannover*, Bürgermeister Finkstr. 19.

Ni konsentas kun la aŭtoro de tiu ĉi pacifista libreto, kiam li asertas, ke la plej grava kaj plej alta celo de la homaro estas la forigo de militoj. Sed ni ne konsentas kaj trovas nekontentiga, ke li kiel "aktiva batalanto" por la mondpaco nur tiel supraĵe kaj per kelkaj ĝeneralaj frazoj, kiujn oni aŭdas el la buŝo de ĉiu ajn, kiu rekomendas sian ideon kiel la sole savigan por la homaro, — pritraktas la *radikojn* de la milit-malbono, la socian fiordon de l' kapitalista reĝimo. Jes, li tuŝetas ankaŭ tiun temon de antagonismoj sur ekonomia bazo kaj eĉ signas la *supernaciecon* de tiuj bataloj. Tamen la grandan formiĝon de la *klasaj* armeoj, de la *klasaj* vicoj, ĉu interne de naciaj limoj, ĉu sendepende de ĉiuj regnaj limoj, li tute ne konsideras. Kaj tial necese li devas malatenti, ke *nur* la laborista klaso, kaj *nur* la *liberigita* laborista klaso povos efektivigi la idealon de l' aŭtoro, la homaran pacon. La aŭtoro ripetas multfoje, ke ni devas fariĝi aktivaj batalantoj por la mondpaco, sed li ne diras (escepte per kelkaj vulgaraj frazoj), *kiamaniere* ni devas batali. Ĉu la aŭtoro scias, kion signifas en la hodiaŭaj cirkonstancoj "aktive batali por la homaro paco"? Tio signifas kontraŭstarigi al la trupoj de l' imperialismo la trupojn de l' Revolucio, tio signifas: *fari revolucion!* N.B.

VARBU NOVAJN ABONANTOJN!

Ĉefa problemo pri komunisma ekonomio

(Fino) de *R. Louzon*

Nu, la produktiloj apartenas al ti-kiuj utiligas ilin, la uzino apartenas al la laboristo, la kampo al la kamparano; plu ne ekzistas kapitalisto, forestas parazito por preni parton el la laboro de la produktantoj, ĉiu tiele posedas la tutan produktaĵon de sia laboro. Sed ekzistas la interŝanĝado. Ni ne forgesu, ke la ŝanĝvaloro de iu objekto dependas de la kondiĉoj en kiuj oni estis dum la fabrikado kaj dum kiuj oni troviĝas ĉe la ŝanĝado; rezultas el tio, ke samaj laboraĵoj ne estas same pagataj.

Ni pliprecizigu: La propreco de la interŝanĝado estas, ke du identaj objektoj estas por la sama prezo interŝanĝataj. Ekzemple, du kilogramoj da samkvalita karbo ĉiam interŝanĝiĝas, ĉu unu, ĉu la alia, por unu sama kvanto da aliaj produktaĵoj. Estas ja evidente, ke se mi, ekzemple, estas produktanto de greno, mi akceptus liveri nur saman kvanton da greno por la unu aŭ la alia de tiuj du kilogramoj da karbo kiuj estas identaj. Nu, se tiuj du kilogramoj da karbo devenas de malsamaj minejoj, ili necesigis por elfosado malsaman kvanton da laboro, ĉu unu de la du minejoj estas pli profunda ol la alia, ĉu la mintavolo estas pli malregula ktp. Sekve, la du grupoj da ministoj, ti-kiu ekspluatas la minejon pli facilan kaj ti-kiu ekspluatas la malplifacilan, ricevos ja saman kvanton da greno, aŭ da aliaj produktaĵoj, por sama kvanto da karbo, sed ne por sama kvanto da laboro. La laboro de la ministoj de la malfacila minejo estos malpli pagata ol tiu de la ministoj de la facila minejo.

Nu, tia situacio estas tre ĝenerala, preskaŭ universala. Ĝi ekzistas en la kampkulturo pro la malsama fruktodoneco de l' grundo, ĝi ekzistas en ĉiuj minejaj kategorioj, ĉe la akvofaloj ktp.

Aliparte, iuj produktaĵoj povas ekzisti iutempe en kvanto pli malgranda ol tiu bezonata. Tiam, ne atentante pri la fakto, ke tiuj produktaĵoj ne postulis pli da laboro, ti-kiuj urĝe bezonas ilin ne ŝanceliĝos proponi pli grandan kvanton da tio, kion ili volas interŝanĝi, kaj sekve la bezonataj produktaĵoj estos troe pagataj...

... La funkciado de komunisma socio sub la formo de grupoj de aŭtonomiaj produktantoj alkondukas do nepre al formiĝo de privilegiataj grupoj.

Sed, aliparte, la eksperienco farita dum la periodo de milita komunismo pli ol necese montris, kaj tio cetere estis facile antaŭvidebla, ke al unueca organizado kolektivisma de la produktado tute mankis je la fleksebleco necesa por normala funkciado de la produktado, kaj ĉefe por ĝia progreso.

Ni do estas alkondukataj konkludi, ke la komunisma ekonomio, ne tiu ekzistonta en la jaro 4 000, sed tiu, kiun ni devos efektivigi post kelkaj jardekoj, konsistos el ia sintezo de ambaŭ principoj. La produktado devas esti dividata inter apartaj grupoj, ĝuantaj larĝan aŭtonomion, kaj interŝanĝantaj siajn produktaĵojn, sed sub la ordonrajto de centra organo regulanta, kies tasko estu enmiksiĝi en la produktado kaj interŝanĝado, tiamaniere ke, kvankam la grupoj povos profiti je la intenseco kaj bona organizeco de sia laboro, ili tamen ne povos proprigi al si la profiton de la favoraĵoj, kiujn liveras al ili la apartaj naturaj kondiĉoj, laŭ kiuj ili produktas, aŭ de tiuj, kiujn liveras al ili la situacio de la merkato. La profiton el tiuj favoraĵoj devas, sub ia ajn formo, elpreni centra organismo, kiu dispartigu ĝin inter ĉiuj.

Kompreneble, tiu sintezo ne povas esti solvata *apriorie* (antaŭeksperimente) per ia doktrina konstruo. Nur per vico da eksperimentoj ĝi povos esti atingata. Oni tamen povas de nun konjekti, ke la eksperimentado iel imitos la metodon de la forko, kiun uzas la artileriistoj por ĝustigi sian pafadon: unu pafo mallonga, dua pafo longa. Al provo tro kolektivisma sekvos provo tro anarkisma, poste provo denove tro kolektivisma, sed malpli ol la unua kaj sinsekve.

Post la milita komunismo, U. R. S. S. alvenis al la NEP, kiu, tion montras la salajrodiferencoj, estis almenaŭ je kelkaj vidpunktoj, provo tro anarkisma. Probable la proksima paŝo estos reveno troa al la kolektivismo. Sed fine la proletaro sukcesos pli kaj pli proksimiĝi al la celo, kiun ĝi difinis al si: starigo de socio el produktantoj, laborantaj libere kaj ricevantaj saman salajron por sama laboro.

El "La Révolution Prolétarienne", tradukis E. L.

Interesiĝantoj pri la temo skribu *esperante* al la aŭtoro je la adreso de la revuo: 17, Rue André-del-Sarte, *Paris* (XVIII).

SUPLEMENTA PAĜO AL
"SENNACIULO"
N-o 35 — 28. MAJO 1925

LA LERNANTO

BALDAŬ APEROS "PETRO".
KIU ESTAS PETRO?
ATENTU VENONTAJN ANONCOJN!

Epizodo
post la granda batalo de Aŭsterlitz

(de J. Popper-Lynkeus)

Dum la granda batalo de Aŭsterlitz grenadista regimento perdis la regimentan standardon, kaj oni rakontas, ke post la batalo Napoleono severtone riproĉis la soldatojn kaj diris, ke ili nur ricevos novan standardon, kiam ili estos neniigintaj ĉi-honton en ia sekvonta batalo. — Tiam la grenadistoj ekploris kiel malgrandaj infanoj kaj en sekvonta batalo luktis tiel bravege, eĉ per primorta maltimo, ke Napoleono kompensis novan standardon al ili.

La perdo de l' standardo estas fakto, sed la priskribo de l' okazintaĵo estas malsincera, nome — laŭ la postuloj de la politika kaj militista interesoj, por ŝirmi la prestiĝon, oni malverigis la raporton koncernan. — La pura vero estas jena:

En la akompano de siaj marŝaloj ktp. Napoleono demandis — post la batalo — la soldatojn: "Kie estas la standardo de via regimento?" Profunda silento. — Denove li laŭtege kaj severtone diris: "Mi demandas, kie vi lasis vian standardon?" — Ree muta paŭzo. —

Sed subite eliris el la vicoj maljuna grenadisto, konata kiel la plej kuraĝa inter ĉiuj kaj vokis al li: „Imperiestro, serĉu ĝin mem!" Pormomente la imperiestro konsterniĝis, sed estris sin tuj kaj ordonis al iu adjutanto, forkondukigi la viron. — Oni sciis, ke tio signifis: "*Mortpafi lin.*" Sed ĵus ĉi-ordono ekscitis junan grenadiston en kies cerbo ekestis tute malkutima pensmaniero (kiun ĉiu pensemulo kapablas evoluigi sin mem), kaj en plej alta kolero, en tia animstato, kiam oni sentas: Je mia vivo, nune mi tion devas diri, aŭ oni neniam plu ĝin diros, ekkonante la grandecon de ĉi mondhistoria sceno, la junulo vokis al Napoleono: "Jes, serĉu mem la standardon, ci murdisto!" — La imperiestro malfermis vaste la okulojn kaj flustris per raŭka voĉo: "Kion signifas tio?" kaj kvazaŭ li volus eviti ian atakon al sia "sanktigita" persono, iom post iom, malrapide, li retiriĝis per sia ĉevalo malantaŭen, dume ĉiam fiksrigardante la junulan grenadiston. —

Antaŭ ol li ebligis ion ordoni, el centoj da soldataj gorĝoj eksonegis la voko: „Niaj kamaradoj pravas. Serĉu mem la standardon, ci amasmurdisto!" Tiam ĉiuj grenadistoj forĵetis la pafilojn en la direkton, kie la imperiestro estis; unu el la pli junaj soldatoj eĉ tiris el sia tornistro ian flikaĵon kaj svingante ĝin, li kriis: "Jen, prenu alian ĉifonaĵon!" —

Nun estiĝis bruego kaj tia ega konfuzo, ke Napoleono kun sia stabo forrajdis tutsilente, ne sciinte fari ion pli bonan, por poste ie interkonsiliĝi pri la aranĝo de tia malnorma afero. —

Fine oni decidis silenti pri la okazaĵo, sendi ĉiujn soldatojn apartenintajn al la grenadista regimento, hejmen, por ke ili ne infektu per ribelveneno la aliajn regimentojn, kaj ankaŭ por ebligi — laŭ la militista falsigmaniero — post ioma tempo tute „belkolorigitan" priskribon. —

Sed kiamaniere tiaj opinioj penetris en la kapojn de la simplaj soldatoj kaj kio kaŭzis la detruon de la ĝistiama severe militista disciplino, — pri tio oni nur supozojn havis. — Sendube Napoleono lasis sekretekzameni la aferon, sed ia ekzakto neniel aŭdebliĝis. —

Hazarde la aŭtoro solan detalon eksciis, nome, ke oni trovis en la tamburo de juna grenadisto, — nevo de la fama filozofo Diderot — iutage papereton kun la enhavo:

„Vi oferitoj de la rekrutigo! Vi, oferitoj
de la kazerna servo!
Atentu kaj obeu laŭ tio:
Se civilizacio kaj justeco regas —
ĉiu rajtas esti martiro de l' propra idealo!
Sed neniam oni rajtas, devigi iun,
esti martiro de alies idealoj;
„ĉar tio estas — — murdo — murdo —
kaj ĉiam nur murdo!"

Laŭ rememoro de koncerna germana legaĵo trad.

E. Berger.

La barilo en la lerneja korto

Orig. de Kastelano

Berto kaj Elso, du dekjaraj knabinoj iris kune al la lernejo. Survoje Berto montris al sia kamaradino sian novan guman pilkon, kiun ŝi ricevis je sia naskiĝtago. Tiu ĉi pilko tre plaĉis al Elso kaj ŝi petis Berton lasi al ŝi la pilkon ĝis la paŭzo. Berto konsentis kaj prunte donis la pilkon al Elso. Antaŭ la lernejo ili devis disiri, ĉar Berto iris al la katolika lernejo kaj Elso iris al la protestanta lernejo. Ambaŭ lernejoj estis en la sama konstruaĵo. Sole fera barilo partigis la komunan korton en unu porkatolika kaj en unu porprotestanta partoj. Al ĉiuj infanoj estis malpermesite de la geinstruistoj — eĉ nur alproksimiĝi je tiu ĉi barilo. Ĉiu parto timis la infekton de la alia flanko. La paŭzo je la deka venis. Malgraŭ la malpermeso Berto jam staris apud la barilo kaj senpacience atendis Elson kun la pilko. Baldaŭ ankaŭ Elso alvenis per longaj saltoj, redonis la pilkon trans la barilon kaj dankis kore. Sed, — ho, ve! — la instruistino de Berto vidis ŝin stari apud la barilo. Tuj ŝi vokis Berton. En la sama momento ankaŭ la instruistino de Elso rigardis tra la fenestro en la korton kaj ekvidis Elson. Ankaŭ Elso estis vokata. Ambaŭ infanoj ricevis pro malobeo ne nur riproĉojn — sed ankaŭ batojn. La barilo restis kiel teruraĵo longtempe en la memoro de la du knabinoj. Post unu jaro el la katolika kaj protestanta lernejoj fariĝis senkonfesa[1]) lernejo. Berto kaj Elso estis nun en la sama klaso. Jam la unuan tagon ili planis forigi la terurigan barilon en la korto. Dum la paŭzo ili intencis realigi sian kriman planon. Sed — ho, bedaŭrinda fakto — ili venis tro malfrue. Aliaj infanoj, kiuj antaŭe ankaŭ ricevis batojn pro la sama krimo, jam detruis la barilon kaj tenante sin je la manoj, ili dancis ronde kaj saltis ĝojege ĉirkaŭ la ruinoj de la barilo. Unu monumento de maltoleremo ne plu ekzistis.

Duĉapitra rakonteto

Ia ĉapitro

La majstro al la seruristo: Via invento estas bonega, ĝi donos multe da profito al la firmo.

La fabrikgvidanto al la majstro: La plibonigo, pri kiu vi ĵus informis min, posedas praktikan valoron, kiu ne estas malgrava.

La direktoro al la fabrikgvidanto: La propono posedas kelkajn atentindajn flankojn.

La generaldirektoro al la direktoro: La ideo estas konsiderinda.

IIa ĉapitro

La generaldirektoro al la direktoro: Por la ideo mi dankas al vi je la nomo de la firmo. Ĉe la kasisto estas ĉeko por vi.

La direktoro al la fabrikgvidanto: Vian proponon mi aprobas. Se okazos plialtigo de la salajro, mi konsideras tion.

La fabrikgvidanto al la majstro: La plibonigo rajtigas vin, pretendi pli da salajro, kion mi konsideros, se la negocado pliboniĝos.

La majstro al la seruristo: Por la invento vi meritus plialtigon de la salajro, sed bedaŭrinde pro malbona negocado tio ne estas ebla, ĉar estas konate ke la produktado ne estas profitdona.

Lingva angulo

La vorteto "da" post numeraloj

Ofte regas malklareco eĉ inter malnovaj esperantistoj pri la apliko de la partitivo "da" post numeraloj. La prepozicio "da", kiu estas aplikata por esprimi kvanton, nombron, mezuron, — ne estas uzata post kardinalaj nombroj, escepte se tiuj nombroj estas *substantivigitaj*.

Ekzemple oni devas diri: dumil homoj (sed ne: da homoj).

Tamen: dekduo da ovoj, miliono da frankoj (post substantivo).

Post ciferaj signoj oni neniakaze povas uzi "da":

Kvankam oni prononcas "kvin milionoj da voĉoj", oni cifere skribas: 5000000 voĉoj (sed ne: da voĉoj).

---

[1]) senreligia, profana.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG